



52-A KONGRESO DE ILEI 13-20 julio 2019, Ĉaĉak, Serbio

Por aliĝi bonvolu uzi la [elektronikan aliĝilon](#) , por rezervi la loĝadon bonvolu uzi la [elektronikan loĝmendilon](#), aŭ, se tiuj ne atingeblas por vi, vi povas uzi la aliĝilon kaj mendilon indikitajn en <http://www.ilei.info/agado/Cacak2019.php> .

Transporto

Ĉaĉak estas atingebla buse, trajne, aŭtomobile, bicikle, aŭ aviadile + aŭtomobile/buse. La plej proksimaj flughavenoj estas tiuj de Beograd kaj Niŝ, de kie trafikaj busoj ĝis Ĉaĉak plurfoje tage.

En Ĉaĉak mem uzeblas publikaj buslinioj kaj malmultekostaj privataj taksioj, tamen ĉiuj kongresaj okazejoj kaj loĝejoj estos promendistance proksimaj.

Por postkongresa vojaĝo al UK en Lahtio eblas rezervi flugon per Air Serbia la 20-an de julio, kun ekflugo je 06h35 el Beogrado kaj alflugo je 10h10 en Helsinkon, troveblan per, ekzemple:

<https://booking.airserbia.com/dx/JUDX/#/home>

LKK organizos malmultekostan transporton el Ĉaĉak ĝis Beogrado je konvena tempo por atingi la flugon. Eblas veturi grupe malfru-nokte la 20-an de julio (do sabaton antaŭmatene), de antaŭ la kongreshotelo en Ĉaĉak ĝis la flughaveno. Aŭ, se vi preferas ripozi en Beogrado la nokton antaŭ la flugo, vi povos veturi grupe vendredon posttagmeze/vespere, ekzemple je 18h00 aŭ post vespermanĝo de antaŭ la kongresejo ĝis hotelo en Beogrado, kiun vi mem rezervos por tiu nokto. La transporton al Beogrado rezervos LKK, sed la hotelon en Beogrado, se vi elektos foriri vendredon vespere, vi povas elekti kaj rezervi, ekzemple, per [booking.com](https://www.booking.com).